PILO-PRESS
Internacia Informservo
N-ro 4/1974 - 25 jan 1974
Aperas ĉiusemajne

Ĉu vi konas la "nimojn" de Esperanto?
Por 6,40 GM vi ricevos la respondon kaj la libron de M. Ĝivoje "Esperantonimoj".

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

## Komunikaj problemoj de gastlaboristoj

Hanovro (pp) Sub la ĝenerala temo "Komunikaj problemoj de eksterlandaj laboristoj kun speciala konsidero de iliaj infanoj en la lernejoj" okazos de la 17 - 26 julio 1974 la ILEI-konferenco en Sonnenberg, FRG. Pri la unuopaj punktoj de la temo ni raportos pli detale en unu el la venontaj numeroj de Pilo-Press.

La kotizo por partopreni la konferencon estas 225,- GM. Ĝi inkluzivas tranoktadon kaj kompletajn manĝojn. Aliĝiloj estas haveblaj ĉe Helmut Sonnabend, D-3161 Dollbergen, Im Eckerkampsfeld 11a.

## Internaciaj kursoj kaj seminario de Esperanto

Burgas, Bulgario. (pp) Sub la aŭspicio de ILEI kaj la metodika gvido de d-ro Istvan Szerdahelyi, estro de la Katedro por Esperanto lingvo kaj literaturo en la Scienca Universitato de Budapeŝto kaj sub la partopreno de Andrzej Pettyn el Varsovio kiel lektoro okazos de la 5 - 24 aŭgusto 1974 internaciaj Esperanto-kursoj por instruistoj kaj de la 11 - 24 aŭgusto 1974 internacia pedagogia Esperanto-seminario en la bulgara urbo Burgas. Informojn donas Bulgara Esperantista Asocio, Instruista Sekcio, bulv. Ĥristo Botev 97, Sofio 3, Bulgario.

***************

*Librairie Française*
*Maison de France*
*Berlin 15, Kurfürstendamm 211*

Après
JE PARLE ESPERANTO (Coll. "Marabout-Flash")
Après
L'ESPERANTO (Coll. "Que sais-je?")
Vient de paraître
L'ESPERANTO SANS PEINE (Méthode Assimil)

Nous rappelons que la Librairie Française entretient un stock d'ouvrages en espéranto (romans, poésie, théâtre, etc.).

Se vi jam estas esperantisto, estu bonvena en nia librejo kaj turnu vin al la respondeculo de la Esperanto-fako, s-ano Beaucaire.

## La patro de Kruko kaj Baniko invitas

Se vi venas al okcidenta Berlino vizitu la francan librovendejon sur Kurfürstendamm. La apuda informo aperis en "La Gazette de Berlin", la revuo de la franca militara administracio en Berlino. La librovendejo havas ankaŭ Esperanto-fakon, kiun estras Louis Beaucaire, la patro de "Kruko kaj Baniko el Bervalio".

L. Beaucaire intertempe verkis "Taglibron de bervalia netaŭgulo", kiu esperEble aperos ankoraŭ antaŭ la Hamburga kongreso.

## Diskutkunveno en Crailsheim

Crailsheim (FRG) (pp) La 8 jan 1974 okazis en Crailsheim sub gvido de Bruno Vogelmann diskutkunveno pri la "Tezoj de la germana lingvopolitiko" de prof. d-ro Helmar Frank, pri kiuj Pilo-Press jam kelkfoje raportis. Pri la tezoj raportis Hermann Behrmann, la prezidanto de la Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj. Okazis vigla diskuto speciale pri la eblecoj enkonduki Esperanton. La loka gazeto "Hohenloher Tagblatt" en tre detala artikolo analizis la tezojn de prof. d-ro Frank en sia eldono de la 10 jan 1974.

## Pedagogia enketo

Katowice, Pollando. Pola instruisto, 39 jaraĝa, Kazimierz Gorzelok, laboranta en la Instituto pri la Edukado de Instruistoj kaj Klerigaj Esploroj en Katowice, petas la helpon de kolegoj en multaj landoj partoprenante en enketado, kiel geinstruistoj en la ĉiutaga laboro solvas la edukajn problemojn ligitajn kun la pritaksado de la scioj de la gelernantoj, en diversaj lernobjektoj laŭ jenaj enketaj demandoj:

1) Ĉu vi uzas iun skalon por la pritaksado de la gelernantoj en via instruobjekto? Se jes, bonvolu priskribi nomojn de la notoj, de la skalo, ankaŭ en la nacia lingvo, ilian eventualan nombran (simbolan) enskribon, kaj konsekvencojn, kiuj rezultas por gelernantoj, kiam ili ricevos difinan noton. Se vi uzas neniun skalon de la notoj, bonvolu mallonge priskribi, kiamaniere vi pritaksas viajn gelernantojn?
2) Bonvolu nomi, kio estas kutime objekto de la pritaksoj, kiujn vi atribuas dum la lecionoj de via instruobjekto?
3) Kiucele vi pritaksas la gelernantojn de via instruobjekto?
4) Ĉu en la pritaksado partoprenas ankaŭ la gelernantoj? Se jes, bonvolu priskribi kiamaniere?
5) Kion oni devas fari, laŭ via opinio, por ke la pritaksado de la instruobjekto estu pli bona instrumento de la edukado?
6) Ĉu vi dum via pedagogia praktiko trovis iun interesan publikaĵon pri la lerneja pritaksado? Se jes, bonvolu nomi ĝin, ankaŭ en la nacia lingvo, aŭtoro, titolo, eldonejo kaj eldonjaro.
7) Aliaj diversaj rimarkoj pri la eduka funkcio de la lerneja pritaksado.

Indikoj pri la respondado:

1) Lando...............
2) Loko...............
3) Plena nomo de la lernejo...
4) Instruobjekto(j)..........
5) Instruiteco...............
6) Kiom da jaroj vi laboras kiel pedagogo?............
7) Aĝo........................
8) Sekso......................
9) Eventuala korespondadreso..
10) Dato........................

Bonvolu sendi la respondojn al:

Kazimierz Gorzelok, ul. Gottwalda 6 g m.24
PL-40-115 Katowice 12, Pollando

*******************

## Prelegoj en Francio

Perpignan (av) René Llech-Walter, kiu nur antaŭ nelonge estis intervjuita de regiona televido, skribis al Akademia Inspektoro por lin informi, ke li estas preta fari prelegojn pri Esperanto en ĉiuj kolegioj kaj liceoj. La Akademia Inspektoro akceptis kaj sendis cirkuleron al ĉiuj estroj de duagrada edukado por ke ili rilatu kun s-ro René Llech-Walter, 5, Quai Vauban, F-66000 Perpignan.
Jam alvenis petoj de kolegioj kaj liceoj; la unua prelego okazos la 11 feb 1974, oni antaŭvidas 300 lernantojn.

## Nova lingvolaboratoria kurso en Paderborn

Paderbon (pp) Nova lingvolaboratoria Esperanto-kurso en la universitato de Paderborn okazos de la 8 - 11 aprilo 1974.

*************

Pilo-Press, jara abonprezo 30,- GM (kun germana eldono END 40,-GM)
Ludwig Pickel, 85 Nürnberg, PSchKonto Nürnberg 819 56-851

## Homoj kaj Nomoj
## kun kaj sen Renomoj

D-ro V. Sadler, direktoro de la Centra Oficejo de UEA, volas eksiĝi el sia funkcio laŭ informo de Boĵa Popoviĉ, vicprezidanto de UEA, en raporto pri la kunsidoj de la estraro de UEA dum la 58a UK en Beogrado (La Suda Stelo, n-ro 4-5/73).

Bertil Englund, sveda esperantisto el Malmö, ludas nuntempe en orkestro "Georg Weyerer" en la tre konata centra restoracio "Königshof" de Stuttgart, FRG.

Andrzej Pettyn, redaktoro de la Esperanto-redakcio de Pola Radio, estas sukcesa aŭtoro de Esperanto-lernolibroj. Lia lernolibro kun 4 longdaŭraj diskoj "Ĉu vi parolas Esperante"? atingis dum 4 jaroj eldonkvanton de 35 000 ekzempleroj. Tiu eldonkvanto reprezentas valoron de 1 500 000 GM aŭ n.gld. laŭ vendoprezo. Vere impona sumo!

Uwe Joachim Moritz, komitatano B kaj delegito de UEA, opinias en cirkulero de la 17 jan 1974, "ke ni devos sufiĉe multe ŝanĝi la politikon kaj la metodojn de nia komuna asocio. Interalie, ni devos doni multege pli da atento al la antaŭenigo de Esperanto en Afriko, Azio kaj Sudameriko; ni devos klopodi kunlabori kun ĉiuj Esperanto-agantoj (kaj ne forpuŝi iujn pro persona malsimpatio); ni devos esence subteni novajn tendencojn...."

Walter Zelazny, Rzeszów, Pollando, salutas ĉiujn germanajn amikojn de Pollando.

S. Milojeviĉ, Jugoslavio, fariĝis vicdirektoro de la Centra Oficejo de UEA. Kune kun d-ro Sadler li estas ŝarĝita pri la kongresaj laboroj.

*****************

## Pliaj novaĵoj pri la UK en Hamburg

### Specialaj kondiĉoj por kongresanoj kun pag-problemoj

Laŭ decido de la UEA-estraro personoj kun pag-problemoj povas provizore aliĝi al la kongreso kaj tamen pagi la kotizon en la komenco de la kongresa semajno laŭ la tarifo de la unua periodo. Por ĝui tiujn specialajn kondiĉojn la aliĝantoj devas plenumi jenajn kondiĉojn:
1)Li devas plenigi aliĝilon kaj sendi ĝin tiel, ke ĝi atingu la konstantan adreson de la Kongreso aŭ unu el la oficialaj kongresaj perantoj plej malfrue la 1.4.1974; 2) Li devas doni validan kialon, pro kiu li ne povas - pro valutaj aŭ pasportaj reguloj - jam transpagi la kotizon; 3) Li devas deklari, ke li certe pagos la kotizon tuj post alveno en Hamburgo.

### 4 temoj por la Oratora Konkurso

Jam estas fiksitaj 4 temoj por la Oratora Konkurso en la 59a UK:

1) Naciismo kaj internaciismo en mia lando.
2) Ĉu internaciaj sportaj konkursoj kontribuas al internacia amikeco aŭ incitas naciismon?
3) Kion volas la junularo en la Esperanto-movado?
4) Perforto en literaturo kaj sur ekranoj.

**************

## Invito al Verdkarnavalio

Al tradicia kunsido karnavala kun varia programo kaj vespera balo la Esperanto-Grupo Osnabrück atendas ĉiujn gemalsaĝulojn, verdajn karnavalistojn kaj aliajn frenezulojn de GEFA, UEA, GEA, SAT, GEJ, GEI kaj LIFKAU el kvar landoj. Loko: Stencgrafenschule Holtmann, D-45 Osnabrück, Herrenteichstr.1. Tempo: Sabate 26.1.1974 je la 16a horo

La semajno en la radio (pp)

La atmosferaj kondiĉoj nuntempe ŝajnas ne esti favoraj por senĝena aŭskultado al la Esperanto-programoj. Tio validas speciale por Radio Romo, kiu ĉi-foje denove ne estis kaptebla, sed ankaŭ por la posttagmezaj programoj el Varsovio, kiu ankaŭ suferas pro ĝenoj fare de Moskvaj stacioj. Ankaŭ en Munkeno la aŭskulteblecoj estas malbonaj laŭ informo de Günter Conrad.

Tamen la sabataj elsendoj el Vieno estis ĉi-foje aŭdeblaj kaj kompreneblaj. Post aktualaj informoj, speciale pri la energetika situacio en Aŭstrio, sekvis raporto de prof. Beckmann pri "inflacio de jubileoj". Laŭ ĝi en la jaro 1974 multaj famaj homoj povas celebri rondciferajn jubileojn, tiel ankaŭ la aŭstria komponisto Anton Bruckner, kiu naskiĝis la 4 sep 1824.

Berno. Svisaj ministroj, kiuj nomiĝas "federaciaj konsilistoj", kaj la svisa registaro estas elektataj kaj formata ne nur laŭ vidpunkto de kapablo aŭ influo, sed ankaŭ laŭ lingvopolitika vidpunkto. Devas esti ekvilibro inter german- kaj franclingvanoj, itallingvano ne devas, sed povas esti konsiderata. Pri la problemoj sur tiu kampo parolis d-ro A. Baur en la lunda elsendo sur ondolongo 49 m.

Pekino. La pekinaj elsendoj ankaŭ ĉifoje bone aŭdiĝis sur ondo 31 m, ili estis klaraj kaj bone kompreneblaj. Post la informoj kaj raportoj el la agrikultura kaj ekonomia vivo de Ĉinio oni povis aŭdi vendrede ĉinlingvajn kantojn kantitaj de infanoj.

Zagreb. Post la kutimaj aktualaj novaĵoj el Jugoslavio oni povis aŭskulti al radia artikolo, kiel jugoslavoj pasigas dimanĉojn. Tiuj artikoloj ĉiam estas interesaj kaj bonstilaj, ili meritus pli longan vivon ol la efemeran en la radio. Ili certe taŭgus por internacia Esperanto-revuo. - Ekde marto la Zagrebaj elsendoj okazos unu tagon pli poste, nome je noktmeza ŝanĝo de vendredo al sabato. Tiu ŝanĝo estas sekvo de proponoj kaj intervenoj de aŭskultantoj argumentante, ke sabato nun estas laborlibera tago por satdormi post la malfruaj E-elsendoj.

Varsovio. Pro atmosferaj perturboj la dimanĉan panoramon de internaciaj eventoj mi povis bedaŭrinde ne aŭskulti. Sed la plenampleksa Esperanto-Ekspreso estis ja aŭdebla lunde matene sur la meza ondo 200 m. Mallonga vortmuzikaĵo memorigis pri la 29a datreveno de la liberigo de Varsovio kun kanto de A. Tomecki, aldoniĝis kelkaj raportoj pri Zamenhof-festoj kaj la rubriko "Niaj aŭskultantoj sciigas.." Denove mi stariĝas la demandon: Kiam ni aŭdos la rubrikon "UEA kaj landaj asocioj informas..."? Elstara estis la intervjuo kun prof. d-ro Istvan Szerdahelyi, Budapeŝto, pri lia funkcio kaj agado en la Budapeŝta universitato. Fakte tie ekzistas la ebleco doktoriĝi en la fako Esperanto. Certe Budapeŝto kaj prof. Szerdahelyi tenas en la mondo "unikan" pozicion, sed estus dezirinde, ke ili perdus tiun "unikecon" kaj Esperanto fariĝu plenrajta fako ankaŭ en aliaj universitatoj de la mondo.

****************

Citaĵo el "Hirtaj pensoj" (Pola Esperantisto n-ro 4/73)

Ĉio estas politiko...

"...Mi sidis ankaŭ kaj ni babilis, trababilis kelkajn vesperajn horojn. En iu momento de la interparolo unu el la gastoj diris: 'Ĉio estas politiko'. Ĉar, kiel vi povas konjekti, ankaŭ politiko estis objekto de nia interparolo......En la interparolo kun niaj skandinaviaj gastoj ni venis al la konkludo, ke - bedaŭrinde - politika pensado estis ĝis nun fremda al granda parto de la eŭropaj esperantistoj. Nun oni devos streĉe lerni tiun ĉi pensadon..."

Jerzy Grum